# *Usonanoj pliigas siajn vizitojn al Kubo, spite al Trump.*



Havano, 7 maj (RHK) La usonaj turistoj estas ree interesitaj voja?i al Kubo, spite al la unuflankaj punoj de la usona registaro gvidata de Donald Trump, kontra? la kariba insulo, tiel informis la insulaj a?toritatuloj.

La komerca direktoro de la ministerio de turismo de Kubo, Michel Bernal, sciigis al la gazetaro ke la kanadanoj estas en la unua loko kaj due, la usonanoj.

Dum la unuaj kvar monatoj de 2019 alvenis al Kubo 257 mil 500 usonanoj, kio reprezentas kreskon je 93,5% kompare al la sama periodo pasintjara, aldonis la funkciulo de la ministerio de turismo.

Li aldonis ke el tiu totalo, 55% alvenas pere de krozad?ipoj, bran?o kreskanta je 48% en la nuna jaro.

La komerca direktoro de la institucio sciigis ke la celo estas atingi la 5 milionojn 100 mil turistoj, kiuj rezultigos ekonomian sumon de 3 mil milionoj da dolaroj.

Spite al la kalumniaj kampanjoj kontra? Kubo, 13,5% de la turistoj kiuj vizitas nin, asertas ke ili elektis la insulon pro ties sekureco (…) krom tio ke ?i estas lando kie ne ekzistas organizitaj krimbandoj, nek  drogadkarteloj, nek okazas sekvestroj kaj oni povas ?ui la destinon je kiu ajn momento, emfazis la funkciulo.

La ministro de turismo de Kubo, Manuel Marrero, anoncis en la socia reto Twitter, ke la insulo jam ricevis la nombron de 2 milionoj da turistoj ?i-semajne, e? dekdu tagojn pli frue ol pasintjare.

---

https://www.radiohc.cu/eo/noticias/nacionales/190024-usonanoj-pliigas-siajn-vizitojn-al-kubo-spite-al-trump

Radio Habana Cuba